*Abaeté*, inter blankaj sablaj dunoj, la religiemon inspiritan de la etoso en la preĝejo *Nossa Senhora do Bonfim*, kies kuracpovo estas mirakla, kaj la magion de la koloroj pentritaj de la sunradioj, sur ĉielo kaj sur maro, en placeto antaŭ la antikva lumturo de *Monte Serrat*.

Ĉu ni povos iam ajn forgesi la buntecon de Plaĝo de la Fortikaĵo (*Praia do Forte*)? En tiu regiono (aparte ĝoja okazo por mi!) eblis vizito al rezervejo de maraj testudoj (*Projeto Tamar*), kiujn oni lerte kaj sperte prizorgas, klopodante protekti ilin kontraŭ estingiĝo. Kaj ĉu eblas forgesi tiun plonĝadon en la travideblaj, ondantaj akvoj, ĉe la plaĝo de *Guarajuba*?

Ĝis revido, Salvador, kaj ek al Fortalezo, nia lasta celo! Jam estis la 31<sup>a</sup> de julio kaj baldaŭ, je la 3<sup>a</sup> de aŭgusto, komenciĝos la 87<sup>a</sup> UK. Restas al ni nur du tagoj, destinitaj por iom esplori la ĉirkaŭaĵojn. Dum, intertempe, la organizantoj ŝvitegis en la lastaj preparlaboroj por akcepti la tutmondan esperantistaron, ni ekskursis al *Morro Branco*, tra labirintaj vojetoj inter *falésias* (eroziaj klifoj) el dekdu-koloraj argiloj, al *Praia das Fontes*, kies dunojn ni supren- kaj malsupren-iris per *dune buggy* (malgranda aŭtomobilo taŭga por kuri sur sabla tereno), al *Lagoinha* mergita en fea medio, inter maro, plaĝo, kokus-arboj, laguno kaj dunoj. Tie eblis eĉ duŝi sin, sur la strando, per dolĉa kaj varma akvo rekte elfluanta el la rokaro. Nekredeble! Kaj ...

... Nekredebla Kongreso!

Bonvenon al la Urbo de l'Suno!

*Alvenis la tago, kiun tuta generacio de brazilaj geesperantistoj atendis! Depost 1981, kiam en Braziljo okazis la 66<sup>a</sup> Universala Kongreso, oni atendis la oportunon kunveni kaj kunvenigi esperantistojn en Universala Kongreso de Esperanto en Brazilo. Se vi alvenis al Fortalezo antaŭ kelkaj tagoj, vi certe jam konatiĝis kun la famkonata afableco de cearaanoj. Tutcerte vi jam spertis la varmecon de brazila vintro sed ankaŭ la samtempe freŝajn marajn ventojn. Se vi ĵus alvenis, prepariĝu por gastronomiaj travivaĵoj!*

*Bonvenon kaj ĝuu Fortalezon!*

Per tiuj ĉi vortoj salutis nin LA BELA SONGO DE L'OMARO, la Kongresa Kuriero redaktita de vigla, ideoriĉa brazila teamo sub la sperta gvidado de James Rezende Piton. Ĉi kuriero, kies titolo ja diras ion pri la fantaziezo de niaj brazilaj geamikoj, informis la kongresanojn dum tuta semajno pri la diversaj okazint- kaj -ont-aĵoj.

Memorinda la malferma ceremonio, ĉeeste de gravuloj, inter kiuj la guberniestro de la ŝtato *Ceará*, Beni Veras, kaj la reprezentanto de la Brazilo prezidento, Ministro gen. Alberto Cardoso, kiu i.a. legis siajn salutvortojn en tre bona Esperanto-

parolo. Sendito de UNESKO, s-ro Patrick Gallaud, legis la mesaĝon de la Asista Direktoro de UNESKO por Edukado, John Daniel. Interese estas, ke s-ro Gallaud ĉeestis nian kongreson dum la tuta semajno, aktive kontribuante en la diskutoj rilataj al UNESKO: kiel ombro sekvis lin Vincent Charlot, kiu senĉese interpretadis esperante-francan kaj inverse, eĉ dum la distraj vesperoj. En la teatra salono sidis la konsuloj de Aŭstrio, Francio, Germanio, Hispanio, Italio, Norvegio kaj Svedio, Rumanio, Usono kaj la Ĉina ambasadoro. Fine, kvindek ses diversnaciaj salutis nome de sia lando, antaŭ la tradicia kantado de la himno "La Espero" fare de ĉirkaŭ 1300-persona entuziasma publiko.

La programo, kiel kutime, estis riĉa, diverstema, interesa; la oratoroj ĉiam tre kompetente prezentis sian argumentaron. Inter tiuj, kiujn mi ĉeestis, rimarkindas la prelego de prof. Cesar Oliveira de Barros Leal, prokuroro de la ŝtato Ceará kaj scienca konsilanto de Latinamerika Instituto de UNO por krimprevento kaj traktado de krimuloj. La titolo estis: *La elĉerpigo de enprizonigo kaj la efika respondo de alternativaj punoj*. Tiun temon li pritraktis en ENPRIZONIGO - KREPUSKO DE ERAO, libro de li malavare donacita al ĉiu kongresano, en la traduko de James Rezende Piton. Per tiu prelego li prezentis al la aŭskultantaro, ankaŭ per diapozitivaj kaj filmoj, la koŝmaran situacion de malliberuloj en latinamerikaj prizonoj, ĉefe en tiuj brazilaj. Oni konatiĝis kun realo tre kruda, kiun tutcerte neniu el ni iam ajn estis spertinta: vere ŝokiga tiu informo, pri kiel homoj, jam senigitaj je libereco, perdas propran individuecon, ĉian dignon, ĉian intimecon kaj suferas je perfortoj, submetiĝas je la leĝo de la plej fortaj, cele al nura pluvivo. La vivkondiĉoj estas je la limo de la tolereblo, en terora etoso, inter ĉiaspecaj krimuloj gardataj de provosoj eĉ pli krimaj. Celo de la aŭtoro estas aplikado de alternativaj punoj, pli humanaj, precipe por homoj kiuj estis punitaj pro krimoj je malgranda ofenda potencialo kaj eviti la amasigon en tre malgrandaj ĉeloj de ĉiaspecaj kondamnitaj, sen ia ajn distingo de la graveco de la delikto.

Alia tre interesa programero estis la kunveno pri Indiĝenaj Dialogoj, kies programo estas aŭspiciata de UEA. Tiam la direktorino de ID kaj Atilio Orellana Rojas prezentis la Fondaĵon, kiu uzas Esperanton kiel ponton inter kulturoj. Indiĝenaj Dialogoj celas mondscale subteni la liberan komunikadon inter la organizoj de indiĝenaj popoloj, reprezentantoj de la plej granda parto de la kultura kaj lingva diverseco en nia planedo. Per esperanto, per modernaj komunikiloj kaj per transkultura trejnado, oni jam sukcesis komunikigi reprezentantojn el tre diversaj popoloj, kio povas

krei perspektivojn por komuna konstrucela agado. En la mondo nuntempe estas ĉ. 5 mil indiĝenaj popoloj, kiuj parolas 4.500 diversajn lingvojn; ĉiumonate malaperas unu-du lingvoj, kio signifas malaperon de kulturo kaj medio, dum la popoloj mem suferas ĉiutage pro daŭra malrespekto de la homaj rajtoj. Tial la indiĝenoj mem serĉas por si komunan lingvon, ĝuste por sukcese komunikadi, plene kaj rekte, por alfronti la mondskalajn problemojn: tio estas klimata ŝanĝiĝo, malsato, manko de akvo, malsanoj, tutmondiĝo, abisma diferenco inter riĉaj kaj malriĉaj popoloj, ktp.

Rete aperas la senpaga bulteno TAMTAMO, en kiu eblas trovi informojn pri ĉi tiu tre grava agado kaj ties evoluo (vd. ankaŭ <http://www.idnetwoek.nl>).

### Eroj el La Bela Sonĝo de l'Omaro

\* Dum flugo al Fortalezo, kolonelo Fernando Marinho el Rio de Janeiro klarigis al stevardino, ke inter la pasaĝeroj estas pluraj eksterlandanoj survoje al la 87<sup>a</sup> UK. "Ĉu eblas, ke la komandanto permesu, ke oni laŭparolile prezentu salutvortojn en Esperanto?" Post permeso de la aviadilestro, s-ano Marinho komisiis la "soldaton" Jorge das Neves plenumi la mision. Per koncizaj vortoj la konata brazila poeto pruvis la taŭgecon de la lingvo. Poste, en la portugala, li dankis al la aviadilistoj pro la afableco. Reprezentanto de RADIO RIO DE JANEIRO sukcesis surbendigi la aeran paroladon de Jorge, same kiel la aplaŭdojn. **Brazila miraklo!!!**

\* Novaj Honoraj Membroj de UEA. Estis distingitaj per tiu titolo la jenaj geesperantistoj, kiuj faris gravajn servojn al la tutmonda Esperanto-movado: Evaldo Pauli (Brazilo), Kathleen Hall (Britio), Kyotaro Deguĉi (Japanio) kaj Hans Bekker (Nederlando).

\* 23 medicinistoj el 10 diversaj landoj ĉeestis la kunvenon de UMEA, dum kiu ties prezidanto d-ro Imre Ferenczy (Hu) raportis pri la laboro farita pasintjare kaj pri planoj estontaj. Estis anoncitaj la okazigo de la 14<sup>a</sup> Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco en la urbo Oradea (Rumanio) julie 2003 kaj la baldaŭa eldono de esperanta-angla terminaro pri medicino, verkita de d-ro S. Yamazoe, nunjare.

\* Nacia Vespero fariĝis grandioza evento. Dum ĝi oni prezentis la popolan kulturon de Brazilo, starigante la esencon de ĝia kulturhistorio, granda mikrado el multaj gentoj. Unue prezentiĝis senĉesa serio de popolaj dancoj kaj kantoj, kiuj montris mirindaĵojn el multaj partoj de Brazilo, laŭ la sono de diversaj afrik-brazilaj muzikiloj. Kaj apoteoza la reprezentado de la tradicia festo, portugaldevena, nuna karnavala manifestiĝo, kiu ekzaltis la publikon, tiom intense ke ĝi ne sukcesis reteni sin je preskaŭ

frenezaj eksterigoj de entuziasmo pro la danca, muzika, kostuma spektaklo. “Brazilo fariĝis la mondo, kaj la mondo fariĝis Brazilo”.

\* Rondo Kato. Trideko da kat-amantoj kunvenis sub gvidado de Francjo Veuthey kaj intersanĝis konsilojn kaj opiniojn pri kat-problemoj. La redaktado de la asocia bulteno FOLIOJ DE KAT-AMIKARO, normale aperinta 3-foje jare, bedaŭrinde tute lamis en 2002: oni esprimis la deziron, ke tiu malreguleco ĉesu kaj ke fine la membroj ricevu tiun valoran interligilon.

\*Universala Artista Ligo de Esperantistoj organizis dumkongresan artekspozicion. En ĝi partoprenis sep artistoj, ĉiuj el Brazilo, tre laŭdataj de la vizitanto.

\*Refondo de la Budhana Ligo Esperantista. Kunvenis interesatoj kaj budhanoj por la refondo de tiu Ligo. Elektiĝis estraro kaj la Japana Budhana Ligo Esperantista sendis sian saluton, petante ties filiiĝon.

\* Manlaboro. Okazis fakkunsido MANLABORO, kun partopreno de ĉirkaŭ 30 esperantistoj. Oni diskutis pri brodado kaj ĝardenkulturo. En Fortalezo la brodado estas tre prospera kaj infanoj heredas ĝin de patrino kaj avino. Eĉ viroj brodas!

Multo ankoraŭ direndus, sed mankas spaco. Konklude, kion plie pri la kongreso? Gaja, aktiva, agema, kantema, dancema, kaj tre, tre pacienca surloka laborantaro kontribuegis igi ĝin neforgesebla. Ĉu estis mankoj, ĉu estis fuŝoj, ĉu estis stumbloj? Ho jes, tucerte, antaŭ- kaj malantaŭkulise, sed ĉio tre facile forgesebilis: fronte al rideto amikiĝema kaj post sprita kaj samtempe kvieta respondo, kiel kontraŭbatali, kiel kontraŭstari? Ja, rido kaj gajeco estas pli infektemaj ol virusoj!

**Elda Doerfler**

## KONGRESA REZOLUCIO

La 87<sup>a</sup> Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Fortalezo (Brazilo) de la 3<sup>a</sup> ĝis la 10<sup>a</sup> de aŭgusto 2002 kun 1484 partoprenantoj el 58 landoj, kun la temo “Diverseco - ŝanco ne minaco”,

**Konstatas**, ke la daŭranta integriĝo tutmonda kondukis al pozitivaj rezultoj, ekzemple internaciaj instrumentoj pri homaj rajtoj, sed ankaŭ al malegalecoj kaj al la ĉiam pli rapida perdiĝo de malgrandaj lingvoj kaj kulturoj,

**Gratulas** UNESKON pro ties agado sur la kampo de lingva kaj kultura diverseco, ekzemple per la Tago de la Patrino Lingvo je la 21<sup>a</sup> de februaro ĉiujare, kaj aparte bonvenigas, ke la Ĝenerala Konferenco alprenis je la 2<sup>a</sup> de novembro 2001 Universalan Deklaracion pri Kultura Diverseco,

**Konstatas**, ke la principoj kaj celoj de UNESKO en tiu kampo kongruas kun la idealoj de la movado por Esperanto, kiu celas per neŭtrala komunikilo transponti la kulturojn, tiel kreante forumon por egaleca interŝanĝo de kulturaj valoroj,

**Atentigas** en tiu kunteksto pri la graveco de la lingva dimensio de kultura diverseco, kaj substrekas la pretecon de la Esperantomovado kunlabori kun ĉiuj organizaĵoj, kiuj okupiĝas pri la kultura dimensio en internaciaj aferoj.

## RISOLUZIONE CONGRESSUALE

L'87<sup>o</sup> Congresso Mondiale di Esperanto, riunito a Fortaleza (Brasile) dal 3 al 10 agosto 2002 con 1484 partecipanti da 58 Paesi, con il tema “La diversità - un'opportunità, non una minaccia”,

**constata**, che l'integrazione mondiale in corso ha portato a risultati positivi, per esempio a strumenti internazionali in difesa dei diritti umani, ma anche a diseguglianze e a una sempre maggiore perdita di lingue e culture minori,

**si congratula** con l'UNESCO per la sua azione nel campo della diversità linguistica e culturale, per esempio mediante l'istituzione della Giornata della Lingua Madre il 21 febbraio di ogni anno, e in particolare si compiace del fatto che la Conferenza Generale ha adottato il 2 novembre 2001 la Dichiarazione Universale sulla Diversità Culturale,

**constata**, che i principi e le finalità dell'UNESCO in tale campo si accordano con gli ideali del movimento per l'Esperanto, che mira - mediante un mezzo di comunicazione neutrale - a collegare le varie culture, così creando un forum per lo scambio paritario dei valori culturali,

**richiama l'attenzione** in tale contesto sull'importanza della dimensione linguistica della diversità culturale, e sottolinea la disponibilità del movimento per l'Esperanto a collaborare con tutte le organizzazioni che si occupano della dimensione culturale a livello internazionale.



**Kolker, Boris** (2002) *Vojaĝo en Esperanto-lando*, Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, paĝoj 279, prezo EUR 18,00.

Multaj el ni okupiĝas pri instruado, de komencantoj kaj de progresantoj kaj de progresintoj. La situacio de la lernolibroj uzablaj en Italujo estas la jena: multaj, eventuale eĉ tro multaj, lernolibroj por komencantoj, malmultaj, eĉ tre malmultaj, por progresantoj kaj fine nenio por esperantistoj dezirantaj akiri la triagradan diplomon de la Itala Instituto de Esperanto.

Ni ĉiuj scias, ekzemple, ke pli ol duono de la libroj rekomenditaj por la tria grado estas praktike neaĉeteblaj.

Bonŝance Boris Kolker, instruisto, akademiano, aktivulo en du kontinentoj, pretervole plibonigis ankaŭ la italan situacion en ĉi tiu kampo. Lia ĵus aperinta *Vojaĝo en Esperanto-lando* jam rikoltis multajn laŭdojn kaj pro tio ni ne simple aldoniĝos al la vico de la laŭdantoj. La plej interesa eldiro, kiun mi aŭdis, estas: «Ĉi tiu libro similas normalan libron por lerni fremdajn lingvojn.» Alivorte grafike kaj ĝeneralaspekte ĝi ne multe diferencas de la lernolibroj pri la angla, kiujn oni trovas en la nuntempaj lernejoj. Kaj jam tio estus granda merito. Niaj instruistoj ne plu devos kaŝi siajn malnovstilajn lernolibretojn kaj pardonpeti pro ilia aspekto jam en la unua leciono («...vi scias...la malvasta merkato...»).

Sed la vera atuto de ĉi tiu libro estas, laŭ mi, ĝia enhavo. En 26 plaĉaj lecionoj ĝi sukcesas prezenti la landon Esperantujo, ties rolantojn kaj ties kulturon. Ĉu vi serĉas la preskaŭ netroveblan versaĵon “Parizo” de Leonard Newell (Postlasis mi la koron en Parizo/...)? Jen ĝi estas en paĝo 17-a. Ĉu vi serĉas specimenojn de pli modernaj verkistoj, ekzemple de Spomenka Štimec, bone konata en Italujo? Jen ĝi estas en paĝo 174a. Ĉu vi serĉas pli movadecajn tekstoj? Jen en paĝo 245a la artikolo “*Kial usonano uzas Esperanton*” de Joel Brozovsky.

Mi ne volas tedi vin per detaloj, sed vi jam komprenis, ke la tuta kulturo de Esperantujo estas antaŭ la lernanto en ĉi tiuj 279 paĝoj. Mi ne havas sufiĉe fortajn vortojn por rekomendi ĝian uzon en Italujo, por doni ĉefe al la lokaj esperantistoj, kiuj malofte havas la okazon vojaĝi eksterlanden kaj sperti persone nian kulturon, la eblecon konatiĝi kun ĝi. Certe ĝi ankaŭ rekomendindas por la duagradaj kaj triagradaj kursoj.

En Fraskato (Frascati), morala ĉefurbo de Ita-

lujo, ni komencos uzi ĝin dum ĉi tiu aŭtuno.

**Renato Corsetti**

**Charles Durand**, *La mise en place des monopoles du savoir*, (La costituzione dei monopoli del sapere). pag. 120 - Ed. l'Harmattan - ISBN: 2747517713 - acquistabile on-line presso <http://www.alapage.com>, <http://www.chapitre.com> - 10,16 Euro

Quest'opera pone in risalto le conseguenze dell'adozione pressoché generale dell'inglese come mezzo di comunicazione internazionale nel campo della ricerca scientifica e tecnologica, subite da circa quarant'anni dai paesi non anglofoni.

Circa 35 anni fa, la maggior parte delle facoltà scientifiche degli Stati Uniti sopprime il loro “Ph.D. foreign language requirement”. Fino a quel momento, per tutti i futuri laureati americani era obbligatorio dimostrare di avere piena padronanza di almeno una delle grandi lingue scientifiche, oltre all'inglese, in modo sufficiente per poter comprendere senza difficoltà ogni pubblicazione sulla loro materia redatta in quella lingua.

Le lingue straniere allora riconosciute dalle università nordamericane come “lingue scientifiche” comprendevano di solito un sottoinsieme di lingue indo-europee (tedesco, spagnolo, francese, russo), semitiche (arabo letterario) e asiatiche (giapponese e cinese mandarino).

Oggi, tranne qualche rara eccezione, questo “Ph.D. foreign language requirement” non esiste più tra le discipline scientifiche. Dopo la sua soppressione, sono state esercitate pressioni dirette e indirette nei congressi scientifici internazionali, prima multilingui, affinché essi divenissero progressivamente monolingui, e la stessa tendenza si è applicata alle riviste e giornali che riportano i risultati della ricerca di base, nei paesi anglofoni come altrove.

“*La mise en place des monopoles du savoir*” presenta un esame dettagliato della situazione attuale e dimostra che l'adozione ufficiale o officiosa dell'inglese come veicolo di comunicazione ufficiale nel solo campo scientifico produce un certo numero di effetti perversi, molto pesanti.

L'attuale quasi-monopolio del sapere tecnico-scientifico moderno detenuto dagli anglo-americani - che qualcuno rifiuta di ammettere - non è legato soltanto ai meriti dei loro ricercatori e tecnici. In gran parte, è la conseguenza diretta dell'adozione della lingua inglese come lingua internazionale nel-



## FORPASIS

**GIORDANO AZZI**, honora membro de IEF, mortis la 1an de julio 2002 en Como, lia naskiĝurbo, je la aĝo de 92 jaroj, post mallonga malsano. Al lia forpaso la loka taggazeto "La Provincia" dediĉis tutan paĝon. Ni memorigas lin per vortoj ĉerpitaj el tiu paĝo.

*"Una mente suprema (altega menso)". Sufiĉas tri vortoj al Aldo de' Giorgi por djfiri Giordano Azzi. La sintezo estas frukto de firma amikeco, komencita en la dua postmilito, kiam de' Giorgi vizitis Esperanto-kurson gvidatan de Azzi. Poste ambaŭ alvenis al la supraj taskoj de Universala E-Asocio. Denove kune, puŝataj de komunaj idealoj, ili aktivis en la literatura grupo Acarya kaj en la Socialista Partio.»*

En la sesdekaj jaroj estrarano de UEA pri kulturo, dum longa tempo komitatano de UEA por Italio, dum jardekoj estrarano de IEF kaj ĝia prezidanto, kun Stoppoloni kaj Dazzini li plene sin dediĉis al kontaktoj kun la politika mondo cele al aprobigo de leĝo favora al instruado de Esperanto en la lernejoj.

Li estis energia organizanto de pluraj kunvenoj kaj de du kongresoj, la 25a nacia en 1953 kaj la 40a en 1969, en kiu partoprenis la tiama pezidanto de UEA Ivo Lapenna. Li tradukis italajn literaturajojn, interalie poeziaĵojn de Pascoli, kaj aktive zorgis pri la eldono de la "Itala Antologio".

Li estis entute unu el la plej elstaraj personoj de la itala esperanto-movado.

\* \* \*

Un pensiero sull'amico **GIOVANNI DOLFI**, scomparso nello scorso luglio. È stato uno dei soci fondatori, insieme a Umberto Stoppoloni, del Gruppo Esperantista di Pistoia nel lontano 1972. In seguito è diventato segretario-cassiere, incarico che ha curato per molti anni.

L'anno scorso, in occasione del rinnovo del consiglio direttivo, ha lasciato la segreteria per assumere l'incarico di addetto alle relazioni esterne. Per lui che, a causa dei propri problemi fisici, non aveva mai potuto partecipare a congressi, convegni e altri incontri fuori Pistoia, questa era una mansione che gli piaceva molto. Infatti, negli ultimi anni, grazie ad internet, si era fatto un giro di conoscenze e amicizie in ambito esperantista che curava e allargava continuamente. In tutti avrà sicuramente lasciato un vuoto ma per chi, come noi, lo conosceva personalmente, sarà ancora più difficile non sentire la sua mancanza. Lui era la serenità fatta persona e, con il suo carisma, era diventato di fatto la guida morale del gruppo dopo la scomparsa di Stoppoloni. (Nicola Morandi)

\* \* \*

La forpaso de **BRUNO VOGELMANN** estas por mi tre malĝojiga novaĵo Kvankam ni ne plu interrilatis en la lastaj jaroj mi konservis ĉiam grandan estimon por li kaj ĉiam rememoras la tempon kiam ni strikte kunlaboris en la ekonomia kampo kaj en pluraj aplikadoj de Esperanto. Mi sendas miajn sincerajn kondolencojn al la germanaj esperantistoj kaj al la multnombraj amikoj de Bruno en la tuta mondo. (Giorgio Bronzetti)

## ENLANDE kaj TRAMONDE

**Chiavenna** - La 3a Esperantista Renkontiĝo en Valtellina okazos la 13an de oktobro 2002 en Chiavenna. Organizas ĝin la Esperanto-Rondo de Sondrio. Informoj: 0342-213242 aŭ 219439.

**Marche** - Pienamente riuscito il primo corso intensivo di esperanto organizzato dal Gruppo Esperantista Marchigiano "La Verda Pego". Ottimo si è rivelato il metodo di insegnamento del lucchese Pier Luigi da Costa; nel giro di poche ore gli allievi si sono impadroniti degli elementi essenziali della lingua.

**Kongreso** - La Asocio de Profesiaj Kongres-Organizistoj (AIMP) asignis la prestiĝan premion "Marco Ferronato" 2002 al G. C. Fighiera pro lia kontribuo al la evoluado de la prikongresaj scienco kaj teknikoj. Fighiera, iama Konstanta Kongresa Sekretario (KKS) de UEA, aperigis ses librojn kaj 15 monografiojn - en itala, Esperanto kaj franca - pri la kongresaj merkato, produkto, manaĝerado kaj organizado.

**Fotokonkurso** - La redakcio de "La Ondo de Esperanto" invitas al partopreno en la kvina Internacia Fotokonkurso. La konkursaj fotoj devas esti senditaj unuekzemplere al la sekretario de la konkurso, Halina Gorecka (RU-236039 Kalinigrad, ab. ja. 1248, Ruslando). Informoj: [sezonoj@gazinter.net](mailto:sezonoj@gazinter.net)

La fotoj devas atingi la sekretarion antaŭ la 15a de decembro 2002.

### FONDAĴO EŬROPO ĈE UEA

**Jardeka strebo de eŭropaj esperantistoj realiĝis. La estraro de Universala Esperanto-Asocio ĵus aprobis la stariĝon de la Fondajo Eŭropo ĉe UEA.**

**Kiel ĉiuj fondajoj ankaŭ ĉi tiu kolektos la kontribuojn de esperantistoj, kiuj aparte aprobas la agadon en Eŭropo kaj ĉe eŭropaj instancoj. La subteno ĉefe iros al la nove kreita Komunikad-Centro en Bruselo, kiu dum nur kelkaj monatoj jam pruvis sian utilecon.**

**La tuj elspezeblaj donacoj kaj la rento de la Kapitalo Eŭropo, kiu akumuliĝos tra la jaroj, estos uzata interkonsente kun Eŭropa Esperanto-Unio.**

**Por esperantistoj validas la kutimaj reguloj por pagi al UEA kun la indiko "por Fondajo Eŭropo". (Renato Corsetti)**

## Esperanto? Ne nur internacia, sed eĉ Interstela lingvo

Kiu el vi konas *Star-Trek*-on? Ĉu vi scias, ke ĉiujare okazas kunveno pri *Star-Trek*-o en Italio? Kaj ĉu vi scias, ke la *star-trek*-filozofio estas preskaŭ sama je la esperanta filozofio? Fakte ankaŭ la personoj el *Star-Trek*-o kredas fortege je internaciismo (ĉu interplanedismo?!), frateco kaj paco. *Star-Trek*-o estas fantascienca televida filma serio kiu havas multajn zelotojn en la tuta mondo. Mi estas unu el tiuj.

De la 23-a ĝis la 26-a de majo en Bellaria (RN) okazis la STICCON (*Star Trek Italian Club Convention*) kaj mi, kun mia familio, partoprenis ĝin.

Antaŭe la *Star-trek*-itala klubo invitis siajn klubanojn starigi grupojn de zelotoj en formo de stelsipoj. Sekve, en multaj italaj urboj, naskiĝis *star-trek*-stelsipoj. Ankaŭ mi, kun aliaj geamikoj el Pistoja E-Grupo, fondis ŝipon kiun ni nomis "U.S.S. Esperanto - ncc 1887".

Ĉiuj ŝipoj havas siajn proprajn flagojn kiuj eksponiĝis en la granda salono de la kongresocentro de Bellaria dum la tuta konvencio. Kompreneble la flago de la U.S.S. Esperanto estas la kutima verda flago kun la kvinpinta stelo kaj kun la simbolo de la stela ŝiparo en sia centro. La amantoj de *Star-Trek*-o, laŭ mia opinio, povus tre multe interesiĝi pri nia afero, ĉar ili jam pensas same kiel ni esperantistoj pri la mondo kaj universo. Krome tio povas esti bondeziranta por Esperanto ĉar ĉiuj ni esperas, ke nia bela lingvo ekzistu ankoraŭ dum la 24-a jarcento, la epoko dum kiu *Star Trek* estas lokita, kaj, se eblos, ĝi estu pli granda kaj fama ol nun.

Ĉiukaze nia verda flago estis vidita de multaj personoj dum la konvencio kaj mi havis la eblon paroli pri esperanto kun aliaj kunvenintoj. Nun ili scias, ke la esperanto-lingvo estas vivanta kaj iuj el tiuj povus fariĝi samideanoj dum la estonto. Certe mi, dum la konvencio, multe amuziĝis.

Pliaj detaloj troveblaj sur nia retejo <<http://www.esperanto-grupo.it/starship>>

**Nicola "Spock" Morandi**



Jen du eksterlandaj, kiuj malkompreneble parolas Esperanton. (presagitejo AINS-A)

### En la mondon venis nova sento... per Interreto!

Se è vero, come si sente dire spesso, che un valido strumento per imparare una lingua, ma anche per entrare in contatto con la mentalità del popolo che la parla, è rappresentato dalle canzoni, ciò è vero anche per quanto riguarda l'Esperanto. Il panorama musicale esperantista è ricco e vario, copre tutti i generi musicali e meriterebbe senz'altro un'attenzione maggiore, magari anche da parte dei non esperantisti (quanti capiscono i testi della musica inglese che ascoltano?). In questa sede farò qualche accenno alla musica in Esperanto scaricabile da Internet, un assaggio e un buon approccio a questa interessante realtà musicale.

Un primo indirizzo è <http://esperanto-panorama.net/unikode/muziko.htm>, il quale fornisce una carrellata su alcuni artisti rappresentativi di vari generi; dal rock all'underground, dalle cover di canzoni nazionali alla canzone melodica, dalla musica popolare al rap. Ci sono link verso altri siti di gruppi e artisti quali Jomart kaj Natasha, Persone, Jomo, Esperanto Desperado, etc. Dallo stesso sito è possibile scaricare anche il celebre inno esperantista, "La espero", cantato "a cappella", giusto per non perdere di vista la tradizione e le radici; secondo me non guasterebbe che fosse riscoperto dai più giovani e cantato anche durante i festival giovanili: la proposta è stata lanciata! Riprenderò il discorso sul prossimo numero.

**Massimo Acciai**



in pulcherrima Fenestrelle, 31 martii A.D. 2002

## VERBALE DELL'ASSEMBLEA ANNUALE DELLA GIOVENTÙ ESPERANTISTA ITALIANA

Presidente: *Giuseppe Castelli*  
segretario: *Massimo Acciai*  
scrutatori: *Paola Grippo, Marta Romanò,*  
*Daniele Binaghi*

L'assemblea comincia alle 14.30

*ordine del giorno:*

1. Approvazione del nuovo regolamento
2. Relazione morale del presidente
3. Relazione finanziaria
4. Elezione del presidente e del nuovo consiglio
5. Varie ed eventuali

### 1. Approvazione del nuovo regolamento

Presenta: *Michele Gazzola*

Proposta emendamenti:

punto 30, pagina 4: obiezione di Daniele Binaghi sulla posta elettronica che non viene accettata dalla maggioranza dell'assemblea.

Il nuovo regolamento è approvato con 18 voti favorevoli e 4 contrari.

### 2. Relazione morale del presidente

Presenta: *Bethuel Chiesa* (presidente uscente)

Obiezione di Francesco Amerio sulla gestione e sull'informazione non trasparente del direttivo.

Obiezione di Daniele Binaghi sulla mancanza

di iniziativa dei soci riguardo Nova Sento. La relazione viene approvata con 17 voti favorevoli, 0 contrari e 3 astenuti.

### 3. Relazione finanziaria

Presenta: *Michele Gazzola* (cassiere uscente)

Relazione approvata con 15 voti favorevoli, 1 contrario e 4 astenuti.

### 4. Elezione

Si candida alla presidenza *Bethuel Chiesa* e viene eletta con 23 voti.

Si candidano come consiglieri: *Manuel Giorgini, Alessandra Masini, Flavia Dal Zilio, Selena Contin, Andrea Bertaglia, Francesco Maurelli, Francesco Reale*. Tutti vengono eletti.

### 5. Varie ed eventuali

Proposta di Federico Breda di tenere una lista di attivisti o di ex-consiglieri.

Proposta di Francesco Reale di un maggior approfondimento linguistico negli incontri per novuloj, obiezione di Alessandra Masini e Sonia Tavarone.

Proposta di Francesco Amerio di porre maggior attenzione ai contatti a livello europeo.

L'assemblea viene chiusa alle ore 16.00.

\* \* \*

## INCONTRI PER NOVULOJ

### A PADOVA!!!

Il 9 e il 10 novembre si terrà a Padova un incontro per *novuloj*, cioè per tutti quelli che si sono avvicinati all'Esperanto tramite il KIREK o altro, o che vi si stanno avvicinando. È un incontro molto interessante da molti punti di vista, eccone alcuni:

1) umano, perché il *novulo* ha un contatto umano (e non più virtuale) con gli esperantisti del posto;

2) informativo, perché permette al *novulo* di chiarire quei dubbi che possono essere sorti durante il corso KIREK.

Pertanto, la IEJ chiede di diffondere la voce a tutti coloro che potrebbero essere interessati. Per informazioni:

*Selena Contin,* *Bethuel Chiesa*  
via Meucci 20, via Guicciardini, 31

35010 Vigonza (PD) 28100 Novara

049-8005045 0321-432136 (casa)

iej@esperanto.it 348-0502163 (cell.)

bethuel.chiesa@esperanto.it

**Nova Sento**  
a cura della  
Gioventù  
Esperantista  
Italiana



**Redazione:**

*Massimo Acciai*  
via C. Cocchi, 13  
50131 Firenze

**Telefono:**  
055412225

*Nicola Ruggiero*  
via Trento, 59  
70042 Mola (BA)

**Telefono:**  
3405696575

nsred@esperanto.it

**Conto bancario** intestato a  
Gioventù Esperantista Italiana,  
ABI 3002, CAB 2002, c/c 650791/  
19, SWIFT: BROMIT2V, Banca di  
Roma, Filiale di Venezia, Agenzia  
n. 8